# *Kantato apogos en Kubo la Tagon de solidareco al Palestino*

*Image not found or type unknown*



Havano, nov 29 (RHK) Kun kantato apoge al la palestina popolo kontra? la agreso de la israela armeo, oni celebros hodia? en ?i tiu ?efurbo la Internacian Tagon  de Solidareco kun la afero de tiu araba nacio.

La centra Kuba Pavilono servos kiel kadro de la renkonti?o, kie kubaj kaj eksterlandaj studentoj kaj aliaj civitanoj postulos tujan ?esigon de la genocido, kiun la cionisma registaro de Benjamin Netanyahu faras, ?iutage, en la Gaza Zono de pli ol unu jaro.

La partoprenantoj denuncos denove la kunkulpecon de Usono en la milita atako en Tel-Avivo, kiu ?is nun ka?zis la morton de pli ol 43 800 palestinanoj en la Gaza Zono, kaj ciferon de pli ol 700 en Cisjordanio, 70%  el ili virinoj kaj infanoj, la? datumoj de UN.

?i tiu kariba nacio esprimis en sennombraj okazoj sian senkondi?an subtenon al la rajto de Palestino esti libera kaj suverena ?tato, kaj pluraj el la amasaj manifestacioj en subteno de tiu afero estis gviditaj de ?iaj plej altaj gvidantoj.

Prezidento Miguel Díaz-Canel renkonti?is la 17-an de novembro en la Palaco de la Revolucio (?efstabejo de la Ekzekutivo) kun 144 junaj palestinanoj studantaj medicinon en la kariba nacio, al kiuj li certigis, ke “Kubo estas, kaj ?iam estos,  flanke de la frata popolo de Palestino."

La ?enerala  Asembleo de Unui?intaj Nacioj (UN) deklaris la 29-an de novembro Internacian Tagon de Solidareco kun la Palestina Popolo memore al la dato, kiam ?i tiu ?enerala organo aprobis Rezolucion 181 (II) pri la dispartigo de Palestino.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/370883-kantato-apogos-en-kubo-la-tagon-de-solidareco-al-palestino

**Radio Habana Cuba**